

Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 443, 1981.01.08 & 10

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Pluraj geaŭdantoj, per siaj leteroj, informiĝis pri Gastejo Edmond Privat, petante ke ni dediĉu elsendon al tiu ĉi feriejo. Tion ĉi ni volonte faras.

A.- La starigo de la feriejo Gastejo Edmond Privat, por ke ĝi povu efektive ricevi gastojn en normale kvieta situacio, kaj ne en domripa etoso, reprezentis kvar jarojn de streĉa laboro. Sed antaŭ ol raporti pri la ĉefaj etapoj de tiu ĉi konstruado, ni diru kelkajn vortojn pri la celado mem de Gastejo Edmond Privat.

Cl.- La 15-an de decembro 1966, sub la aŭspicio de Svisa Esperanto- Societo kaj de Esperanto-Edukistaro de Svislando, estis fondita Kultura Centro Esperantista. Inter la celoj de tiu ĉi Centro, kies sekretario mi estas, listiĝas libro-servo, eldono de kursoj de Esperanto por komencantoj kaj progresantoj, eldono de studoj, kreo de internacia feria altlernejo, ktp. Montriĝis, ke tia alt-lernejo povos efektive funkcii, nur kiam la Centro mem posedas konvenajn kursejojn kaj seeble gastĉambrojn por la loĝado de la kursanoj. El tio naskiĝis la projekto pri gastejo.

A.- La Komunumo La Chaux-de-Fonds favore reagis al la projekto pri feriejo por esperantistoj, tial Kultura Centro Esperantista instaligis en tiu ĉi urbo en julio 1974. Regulaj rilatoj inter la Direkta Komitato de Kultura Centro Esperantista kaj la Plenuma Estraro de la Komunumo La Chaux-de-Fonds kondukis al la kreo de Fondumo, kies celo estas la iompostioma akiro de domoj apartenantaj al la Komunumo, entute sep domoj po kvinloĝejoj, kaj la transformado de tiuj ĉi konstruaĵoj al feriejo kun gastĉambroj kaj al altlernejo kun konvenaj kursejoj kaj administrejoj.

Cl.- Preciza fonduma statuto estis redaktita en kunlaboro kun la prezidinto de la urbo, s-ro André Sandoz, kaj advokato Maurice Favre, kiu esperantiĝis kaj fariĝis la notario de la fondumo, kiu ricevis la nomon Gastejo Edmond Privat.

A.- Kial la nomo Edmond Privat? Ĉar ĝuste kvindek jarojn antaŭe tiu fama pioniro de Esperanto estis iniciatinta okaze de la 17-a Universala Kongreso en Ĝenevo la Internacian Someran Universitaton. La domoj aĉetotaj estis ĝuste konstruitaj la saman jaron 1925.

Cl.- Oni esperis subskribi la akton de la Fondumo "Gastejo Edmond Privat" en 1975, sed tio ne eblis, ĉar tro da juraj demandoj devis antaŭe solviĝi. Tiu ĉi solena subskribado okazis nur la 12-an de novembro 1976, sed en 1975 jam okazis la unua kurso de la ĵus fondita Internacia Feria Altlernejo. Claude Piron, ties prezidanto, gvidis dusemajnan kurson pri la tradukado al Esperanto, kaj ekde tiam la informilo pri La Chaux-de-Fonds salutas la turistojn ne nur en la franca, germana kaj angla lingvoj, sed ankaŭ en Esperanto.

A.- La fonda akto de "Gastejo Edmond Privat" tiel difinas la celojn de la fondumo: "...Disponigi al la eŭropa esperantistaro, pere de Kultura Centro Esperantista, ekipitajn kunvenejoj kaj gastĉambrojn, cele al la organizo de kursoj - interalie tiuj de Internacia Feria Altlernejo - , de kongresoj, de renkontiĝoj kaj cele al la administrado de tiu kultura aktiveco internacia."

Cl.- Prezidas la Konsilantaron de la Fondumo s-ro Andre Sandoz. En ĝi kunsidas du reprezentantoj de la Komunumo La Chaux-de-Fonds, tri reprezentantoj de Kultura Centro Esperantista kaj reprezentanto de la Justica Departamento de la Ŝtato Neuchâtel. Tiuj konsilantoj rajtas alelekti novajn membrojn, kies nombro ne estas fiksita. Ekzemple alelektiĝis arkitekto de la urbo, kiu ricevis la permeson senpage gvidi la modernigon de la aĉetotaj domoj.

A.- La Komunumo La Chaux-de-Fonds delegis en la Konsilantaron de Gastejo Edmond Privat la direktoron de la kulturaj aferoj kaj la direktoron de la urba biblioteko, la ŝtato Neuchâtel delegis la unuan sekretarion de la instru-departemento, kaj Kultura Centro Esperantista delegis la tri membrojn de sia Direkta Komitato.

Cl.- La Fondumo ricevis la statuson de ŝparkaso aŭ banko, kio ebligas la senperan alpruntadon de la necesa monkapitalo. La apogo de la esperantistaro estis vigla, ĝi manifestiĝis per regula alpruntado, kiu konsistigas al la Fondumo kapitalon, kiu atingis fine de la jaro 1980' la sumon de 450'000 frankoj.

A.- La apogo de la Komunumo La Chaux-de-Fonds manifestiĝis per la cedo de aĉetraĵto favore al la Fondumo je 7 komunumaj domoj bone adaptitaj al la funkcio de centro ferieja kaj kultura. Vastaj ĝardenoj ĉirkaŭas tiujn ĉi domojn, kiujn la Fondumo povas akiri dum dek jaroj je la prezo de po cent mil frankoj.

Cl.- Du unuaj domoj estis akiritaj la 5-an de septembro 1978 kaj la tria povos esti aĉetita en 1981.

A.- Tiuj du unuaj domoj okaze de inaŭgura ceremonio ricevis la 2an kaj 3an de decembro 1978 la nomojn de tre famaj pioniroj de Esperanto, tio estas la nomojn de Ernest Naville, kiu estas ankaŭ konata pro sia laboro favore al la proporcia balotsistemo, kaj de Pierre Bovet, kiu estas unu el la patroj de la aktiva pedagogio. La tria domo ricevos la nomon de Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio.

Cl.- La jaroj 1979 kaj 1980 estis dediĉitaj al transformlaboroj: instalado de la centrala hejtado en ambaŭ domoj, konstruo de plurcela kunvenejo, kiu ricevis la nomon de Klara Zamenhof-Zilbernik, kreo de gastĉambroj kaj modernigo de certaj loĝejoj, kies unu luprenas la Kooperativo de Literatura Foiro. Kultura Centro Esperantista ricevas la gastojn en akceptejo, kiu samtempe ludas la rolon de libro-vendejo. Baldaŭ du novaj kursejoj povos esti kreitaj, sed jam ekde nun povas disvolviĝi la kursoj de Internacia FERIA Altlernejo en tute konvena stud-
etoso.

A.- Ekster la kursperiodo, kaj tio ĉi dum la tuta jaro, la esperantistoj povas veni feriad. Ĉiu povas utiligi la komunan kuirejon. La gastoj ŝatas tiun ĉi moder-prezan restadejon, kies ĉambroj estas komfortaj, kies komuna kunvenejo estas tre plaĉa kaj kies situo estas en ideala loko, borde de la urbo, apud vastaj paŝtejoj kaj belaj arbaroj. Trolebuso haltas je cent metroj de la domoj, magazenoj staras en tuja apudeco. Vintre skilifto grimpigas la skiemulojn al la supro de la monto apuda kaj ĉiusezone promenvojoj invitas al migrado marŝa aŭ skia.

Cl.- Iu ajn povas veni ferii en tiu Gastejo Edmond Privat, kiu situas je mil cent metroj de alteco en la montaro Ĵuraso. Kaj iu ajn povas malfermi ŝparkonton por kontribui al la iompostioma kreskado de la kapitalo, kiu ebligos la aĉetadon kaj la transformadon de la 5 aliaj domoj. Estas kuraĝige scii, ke la mono, kiun oni ŝparas, estas utila ne al banka

spekulacio, sed al la konstruo de vera Esperanto-kvartalo, kie la tutan jaron la esperantistoj sin sentas hejme en ripoziga etoso studinstiga.

A.- Jen kio jam estas Gastejo Edmond Privat.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*